Österreichische
Nationalbibliothek

<<La>> liberpensulo: bulteno de Liberpensula Frakcio de S.A.T.

Liberpensula Frakcio de S.A.T.
Paris; FRA 1954-1956

Signatur: 706613-B / 706613-C.1954-1956
Barcode: +Z65384308

Umfang: Bild 1 - 14

**Nutzungsbedingungen**
Die Österreichische Nationalbibliothek macht an diesen Inhalten kein eigenes urheberrechtliches Verwertungsrecht geltend. Sie erklärt sich insofern auch mit einer Nachnutzung dieser Inhalte in der abrufbaren Qualität ausdrücklich einverstanden. Dies gilt auch für die Verwendung dieser Inhalte in Online-Foren, Blogs und in Social-Media-Kanälen wie Facebook, Instagram, Pinterest etc.. Unabhängig davon sind allenfalls bestehende Rechte Dritter an den Inhalten vor jeglicher Nachnutzung vom Verwender individuell zu klären.

Bei einer Nutzung unserer Inhalte ersuchen wir um die Angabe eines Bildnachweises (Titel, Datierung und weitere verfügbare Beschreibungen) und um eine Quellenangabe (Zitierlink aus [Portal] und der Verweis "[Portal]/Österreichische Nationalbibliothek"). Für Postings auf Facebook oder Instagram ersuchen wir um Verlinkung des entsprechenden Accounts der Österreichischen Nationalbibliothek.

706.613-C.Ep—

# LA LIBERPENSULO

Por Racio... ★ Per Esperanto...

## Bulteno de Liberpensula Frakcio de S.A.T.

Nº 1

Redakcio : GAY André, rue Lambert-Dumesnil
HERBLAY (S.-et-O.) Francio - C. C. P. Paris 10549-49

Jaro 1954

## NASKIĜO !

Nia Frakcio estas dujara ! Ĝis naskiĝis post mia alvoko en Sennaciulo de decembro 1952, kaj de nun estas bona kerno da frakcianoj en sekvantaj landoj : Francio, Germanio, Sarlando kaj Svisio. En Britio kaj en Nederlando, la kelkaj frakcianoj... dormetas.

Nia tasko estas grandega, ĉar ni celas emigi al la kamaradoj nenion kredi sed ĉion pripensi. Ni deziras kontraŭbatali la dogmojn, *ĉiujn dogmojn*.

La devo de ĉiu konscia ateisto, raciisto, anogstikisto, k.s., estas nin helpi en tia gravega tasko.

Hodiaŭ aperas la unua numero de nia Bulteno, dank'al la monhelpo de kelkaj kamaradoj. Ni ilin dankas.

Ĉu ĝi aperos ofte, regule ? Tio dependos de la sukceso de tiu-ĉi unua naskito. Vi povas nin helpi aĉetante multkvante nian bultenon, ĝin disdonante kaj ĝin diskonigante.

Ni pretas fari nian tutan taskon, faru la vian !

Gajulo.

## RELIGIOJ KAJ STATISTIKO
## " UNIVERSALA DIO REVELACIUS UNIVERSALAN VERON "

Tion skribis, en sia fama testamento, pri kiu jam atentigis Voltero, parohestro Meslier (Melje'), mortinta 1753.

Lian tekston oni ankoraŭ nun povas utile legi :

« Tiel malsame sin konigis Dio en la diversaj landoj de nia terglobo, ke pri religio la homoj sin reciproke rigardas kun malamaj kaj malŝataj okuloj. La anoj de la diferencaj sektoj sin opinias reciproke tre ridindaj kaj tre malsaĝaj. La misteroj plej respektataj en iu religio estas mokindajoj en alia. Ĉar Dio penis sin malkaŝi al la homoj, almenaŭ li devus paroli al ĉiuj la saman lingvon ; kaj maltrudi al ilia mallerta menso tiun embarason : serĉi, kiu povas esti la religio vere elveninta de li, kiu estas la kulto vere agrabla al liaj okuloj.

« Universala Dio devus revelacii universalan religion. Pro kiu fatalo troviĝas do tiom da malsamaj religioj sur la tero ? Kiu estas la vera inter la multo de tiuj kiuj pretendas esti tia, ĉiu ekskluzivante ĉiujn aliajn ? Ja konvenas kredi, ke neniu ĝuas tian superecon ; divido kaj disputo inter la opinioj estas la nedubindaj signoj pri necerteco kaj malklereco de la principoj el kiuj oni deduktas. (§ 114) »

« Por saĝa homo, nenio aperas pli ridinda ol la opinio formata, unu pri

la aliaj, fare de egale malsaĝaj anoj de la diversaj religioj, kiuj enloĝas la teron. Kritano trovas la Koranon, t.e. la dia revelacio anoncita de Mahometo, nur teksaĵo el senhontaj revaĵoj kaj el mensogoj insultantaj Dion. La mahometano siaflanke nomas la kristanon idolano kaj hundo ; vidas nur absurdaĵojn en lia religio ; opinias, ke li rajtas konkeri lian landon kaj trudi lin perglave al akcepto de la religio de la dia profeto ; li kredas ĉefe, ke nenio estas pli malpia, pli malsaĝa ol adori homon, aŭ kredi je Triunuo. La protestanta kristano, kiu senskrupule adoras unu homon kaj firme kredas la nekompreneblan misteron Triunuo, mokas la katolikan kristanon, ĉar tiu ĉi kredas plie je la mistero de transsubstanciĝo ; li nomas lin freneza, malpia, idolana, ĉar li surgenuas por adori panon, en kiu li opinias vidi la Dion de la universo. La kristanoj el ĉiuj sektoj konsente konsideras stultaĵoj la enkorpiĝojn de la Hindia Dio Viŝnu ; ili asertas, ke la sola vera enkarniĝo estas tiu de Jesuo, filo de la Dio de la universo kaj de la edzino de ĉarpentisto. La teisto, kiu sin diras ano de religio, kiun li supozas la religio de la naturo, kontenta agnoskante Dion pri kiu li havas nenian ideon, kuraĝas ŝerci pri ĉiuj aliaj misteroj instruataj de ĉiuj religioj de la mondo (§ 116) ».

« Dio parolis diverse al ĉiu popolo de la loĝata globo. Hindo kredas eĉ ne unu vorton pri tio, kion li diris al la Ĉino ; la mahometano rigardas fabeloj kion li diris al la kristano ; la judo rigardas kaj la mahometanon kaj la kristanon kiel sakrilegiajn koruptintojn de la sankta leĝo donita de sia Dio al siaj praŭloj. La kristano, fiera pro sia pli moderna revelacio, damnas egale kaj la Hindon, kaj la Ĉinon, kaj la mahometanon, kaj eĉ la judon, el kiu li ricevis siajn sanktajn librojn. Kiu pravas ? Ĉiu krias : ja mi ! Ĉiu alvokas la samajn pruvojn ; ĉiu parolas al ni pri siaj mirakloj, siaj divenistoj, siaj profetoj, siaj martiroj. La saĝulo respondas al ili, ke ili ĉiuj deliras ; ke Dio ne parolis, se veras ke li estas spirito kiu povas havi nek buŝon nek langon ; ke la Dio de la universo povus, sen prunti la peron de la mortontoj, inspiri al siaj kreitoj tion, kion li volus, ke ili lernu ; kaj, ĉar ili egale kaj ĉie ne scias kion ili devas opinii pri Dio, evidentas ke Dio ne volis ilin instrui pri tio.

« La anoj de la diversaj kultoj establitaj en tiu ĉi mondo sin akuzas unuj la aliajn pri superstiĉo kaj malpio. La kristanoj abomenas la superstiĉojn paganan, ĉinan, mahometan. La romkatolikoj taksas malpiaj la protestantajn kristanojn ; tiuj ĉi senĉese mallaŭdas la roman superstiĉon. Ili ĉiuj pravas. Esti malpia, tio estas havi opiniojn insultantajn al la Dio, kiun oni adoras ; esti supertiĉa, tio estas havi malĝustajn ideojn. Sin reciproke akuzante pri superstiĉo, la diferencaj religiistoj similas ĝibulojn, kiuj riproĉus unuj al aliaj sian difektan strukturon (§ 127) ».

Kvankam iom longaj kaj ripetaj, la tekstoj de pastro Melje' indas la legadon.

En lia tempo, oni ankoraŭ ne havis sufiĉe fidindan takson de la nombro de la homoj. Melje' do ne povis subteni siajn argumentojn per ciferoj. Hodiaŭ niaj statistikoj, kvankam ne perfektaj, donas bonan indikon pri la homkvanto de nia terglobo. Mi do scivole deziris kontroli kalkule la Meljeajn asertojn

Tion mi faris por la nuna epoko kaj ankaŭ por la pasinta tempo.

Malgraŭ la amasbuĉadoj (33 milionoj da homoj, junaj kaj maljunaj, dum la dua mondmilito), la homaro rapide kreskas laŭ nombro. Oni taksas ĝin nun pli ol 2400 milionoj da homoj. La plej rapidaj kreskoj de la lastaj jaroj ŝajne okazis en Azio, kie — ĝis nun — la militoj estis malpli sangaj ol en nia maljuna Eŭropo.

Jusaj statistikoj pri la religioj mankas. Ĉar mi ne estas sufiĉe kompetenta pri statistiko, mi rezignis starigi *nunan* distribuon de la religioj en la mondo el la antaŭa statistika materialo. Mi nur donos la staton antaŭ kelkaj jaroj : tre probable la proporcioj poste indikataj ne multe ŝanĝiĝis.

En la epoko 1930-1940, kiam la tuta homaro nombris ĉirkaŭ 1900 milionojn, la plej fidindaj aŭtoroj dispartigis ĝin jene inter la diversaj religioj :

| | | | |
|---|---|---|---|
| kristanoj | milionoj : 450-550 | t.e. elcento : | 23-29 % |
| el kiuj : katolikaj | 250-270 | | 13-14 % |
| protestantaj | 120-170 | | 6- 9 % |
| orientaj | 100-120 | | 5- 6 % |
| budaanoj | 130-500 | | 7-25 % |
| ĉinaj religianoj | 300 | | 16 % |
| hindaj religianoj | 150-200 | | 8-11 % |
| islamanoj | 220-240 | | 11-13 % |
| judoj | 10- 20 | | 1 % |
| fetiĉanoj, ktp | 140-240 | | 7-13 % |

Oni notu la diferencon inter la nombroj : ili devenas unue de la diversaj valoroj de la popoltabeligoj laŭ la landoj ; due de la malprecizo kiu regas pri la religiaj apartenoj.

Tamen la necerteco de la ciferoj ebligas *certan redubeblan* konkludon : neniu granda religio atingas la plimulton sur nia planedo. Apenaŭ la triono de la homaro povas pretendi ambaŭ kristanismo kaj budaismo : sed oni ne forgesu pri la sektoj kaj konfesioj !

Oni ankaŭ notu, ke ĉiuj statistikoj enkatalogas samtempe la verajn religiulojn kaj ĉiajn malpiulojn kaj nekredulojn. Ekzemple Melje, kiel pastro, ŝajne povis prave kuŝi sur la listoj de la bonaj katolikoj, kaj tamen... Kiom da baptitoj, kiel mi mem, ŝveligas la ekleziajn statistikojn, kvankam ili fariĝis konsciaj aŭ nekonsciaj senreligiuloj !

Mi memoras, ke la katekismo instruis al mi, kiam bubo : « Dio kreis la homon, por ke li lin konu, lin amu kaj lin servu ». Temas pri la Dio de la katolikoj, tiu Dio kiu ekskomunikas ĉiajn herezulojn kristanajn, ne parolante pri la « paganoj ». Eĉ ne la sepono de la homaro konas kaj agnoskas lin : La ĉiopovanto ne bone organizis la aferon por esti taŭge « servata » ! Li ne estas sola el sia speco : ĉiuj aliaj dioj flaskis, ĉiuj estas tiom malbone servataj.

Kaj tion oni povas konstati por ĉiuj epokoj de la homaro.

Kvankam la nunaj statistikoj estas ankoraŭ malprecizaj, la historiistoj tamen povis dedukti el ili la intajn homkvantojn ; praktike ili konsideras la rezultatojn kiel sufiĉe fidindaj retroirante ĝis la deksepa jarcento.

Se ni esploras la aferon en tiu epoko, ni trovas : mondhomaron de maksimume 500 milionoj da homoj, el ili ĉirkaŭ 20 % da kristanoj, 18 % da islamanoj, k.t.p. Neniu Dio estis tiam pli bone servata ol nun !

Mi scivolis ankaŭ ekhavi juĝon pri la nombro de la homoj, kiuj vice sin sekvis sur la tero, de post iu dato. Nenie mi trovis indikon pri tiu temo ; tamen mi kuraĝis konjekti. Per du diversaj metodoj, laŭ la nombro de la generacioj, kaj laŭ konataj procentoj de naskoj, mi atingis ciferojn : mi proponas ilin tute senpretende, ili estas ege proksimumaj.

Mi limigis min en la kadro de la religio ĉefa en mia lando, ĉefa en mia kontinento, t.e. la kristana ; kaj mi konsideris ĝin en sia tuta historio. De la komenco de nia erao, do de post kelkaj jardekoj antaŭ la naskiĝo de kristanismo, dum tiuj 19 ½ jarcentoj pli ol 30 miliardoj da homoj naskiĝis kaj mortis. Pleje 8 miliardoj estis kristanoj, sen distingo de la sektoj kaj konfesioj.

Se la Dio de la kristanoj estas pli tolerema ol siaj teologiistoj, se li akceptas ankaŭ la herezulojn, li do « savis » makismume 8 miliardojn da homoj, — supozante komprenebla ke ĉiuj baptitoj estis senpekuloj, aŭ havis « bonan morton » post taŭga sakramento. Sed ni memoru ke, eĉ en la epokoj de pleja pieco, la katedral-skulptistoj kaj pentristoj ne timis figuri en la infero, ne nur reĝojn, sed pastrojn, episkopojn kaj papojn. Niaj 8 Miliardoj probable malpliiĝis ege ol ili atingis la paradizon !

Mi konkludas senhezite : la ĉiopova ne bone sukcesis.

Jam li estis spertinta kelkajn malfacilaĵojn pro la anĝeloj kaj pro iu

Lucifero... Kiam li estis ankoraŭ Jehovo, Saboat aŭ Elohim, kiel vi preferas, li devis puni la unuan homon, puni liajn idojn per diluvo... Li sendis sian propran filon al la morto, pro stranga interŝanĝo ; li sendis apostolojn, li sendis miraklistojn, li sendis Konstantinon kaj multajn reĝojn kiuj konvertis perforte aŭ persvade siajn regatojn, li sendis misiistojn, li sendis la Sanktan Inkvizicion, li sendis la Jesuitojn « por Sia plej granda gloro », li sendis la Virgulinon al ĉiuj lokoj kie oni atendis ŝin, al Lurdo, al Fatimo, li eĉ dancigis la sunon en la ĉielo unue por la Fatimaj viziuloj, due en speciala reeldono por la nuna papo en la Vatikanaj ĝardenoj, ĉio vane, vane, vane...

Senfine bona Dio toleras, ke grandega plimulto de liaj homaj kreitoj estas poreterne damnataj ; senlime potenca Dio vane penas, por plibonigi la statistikon ! Neniu kontraŭreligia argumento ŝajnas al mi pli drasta.

An Kaŭ.

## « ESPERANTO KAJ SEKULARISMO »

de P. Victor Morris,

Sekretario, brita Nacia Sekulara Societo

En la daŭrado de tridekjara membreco de la societo de kiu mi nun estas la sekretario, mi estas konstatinta, ke pluraj entuziasmaj Esperantistoj ĉiam troviĝas inter niaj vicoj. Eksciinte lastatempe ankaŭ per artikolo en nia gazeto « The Freethinker » (La Liberpensulo), ke kvar milionoj da Esperantistoj vivas en la mondo hodiaŭ, mi povas eldiri, ke ilia proportio devas esti almenaŭ sesoble pli granda, ol en plej multaj el alispecaj aroj de la mondlaŭgantaro.

Laŭ kiu cifero ŝajnas, ke nia movado estas forte simpatiema al la celo aldoni mondlingvon al jam ekzistantaj nacilingvoj, por faciligi la plej plenan komprenon inter ĉiuj popoloj. Tamen mi ne scias, ke iu gvidanto en nia movado iam estis praktikanta Esperantisto, nek mi mem povas pretendi esti tiu. Mi petas al la legantoj konstati, ke tio-ĉi okazas pro trookupado pri aliaj taskoj ne malpli gravaj.

Se tiuj plej agemaj en la Sekularista movado, kiu batalas savi la homan menson kaj homan vivon kontraŭ la influo de superstiĉo, malpensado, maltoleremo kaj reakcio, ne povas trovi la tempon lerni Esperanton nun, ili tamen komprenas, ke la universala enkonduko de Esperanto kiel instruata temo en lernejojn kaj universitatojn estus unu el la plej grandaj paŝoj antaŭen iam ajn alprenota en la marŝado de l'homaro al civilizado, kiu meritus la nomon.

tradukis Valrando.

*Noto :* La brita Nacia Sekulara Societo kunigas liberpensulojn el iuj landoj en la Brita Komunaro. Do membroj ankaŭ troviĝas ekster Britio mem, ekzemple en Kanado, Aŭstralio, Nov-Zelando, k.t.p.

*Noto de la Redakcio :* Ni pensas, ke la Kdo P. Victor Morris eraras, tiam li diras, ke multaj en la Sekulara Movado ne lernas Esperanton pro manko da tempo. Pli ĝuste, estas tial, ke ili ne vidis ĝis nun la gravecon de la problemo. La universala enkonduko de Esperanto en lernejoj kaj universitatoj okazos nur, kiam sufiĉa kerno da Esperantistoj sukcesos tion trudi.

### ĈU POSTE AŬ JAM NUN ?

En landoj regataj de Romo
Mallumas en homo kaj domo.
Kaj same ĉe la reformitoj
Ne brilas tre lumaj spiritoj.
Eĉ kie aktivas kristsekto :
Nur kredo kaj ne intelekto.
Ĉar ili proklamas per vorto
Feliĉon, sed nur post la morto.
Profitas el tiu ĉi stato
Per helpo de leĝdona ŝtato
Nur bonza supera tavolo
Je kostoj de simpla popolo.
Sed ni, — ni jam volas sur tero
Konstrui en paco, libero
En frata komuno per faro
Bonfarton por tuta homaro !

(Originale de Kastelano)

### LA SENMORTAJ DIOJ

Senescepte ĉiuj Dioj
Venis nur el iluzioj
Kaj ĝis nun ne malaperis,
Ĉar per ili ja prosperis
Ligo kun negoc-afero
Sub vualo de « Mistero » !
Dioj sen perfort', sen or'
Jam tre baldaŭ estus for !

### KREDA FORTO

Ĉar kutimo tia estis,
Kelka kiel suĉinfano
Brave iĝis jam kristano
Kaj fidele ambaŭ restis
Sen ŝanĝiĝo ĝis la morto
Dank' al firmkredema forto !

(Originale de Kastelano)

Se vi deziras nin helpi en nia batalo kontraŭ la Eklezioj, fariĝu Liberpensula Frakciano !

## DEVENO DE LA HOMO

Se Dio ne faris la Mondon, evidentas, ke li ankaŭ ne faris la homon.

Ĉar la homo estas nur sensignifa parteto de la mondo.

Ni estas nek superaj, nek eksteraj al la Naturo ; ni partoprenas en ĝi, ĝis nin intermiksi kun ĝi, obei al la samaj leĝoj, kaj esti kuntrenitaj per identa movado.

Mi min sentas tiom malnova, kiom la universo ; tiom ĉiama, kiom ĝi ! La molekuloj, kies mi estas konsistigita, estas nutrataj, provizataj per nememorebla forto. La fluo, kiu trakuras miajn vejnojn, vibrigas miajn fingrojn aŭ febrigas mian cerbon, estas la sama, ol tiu, kiu forportas la gigantajn mondojn en la spacego, aŭ kiu kreskigas la herberon sub miaj piedoj...

Profesoro Karel (Carrel) faris vere kuriozan eltrovon, kiam li elpruvis, estas proksimume dudek jaroj, ke eblis kulturi homajn histojn EKSTERE DE LA ORGANISMO.

Fragmento el nia korpo (haŭto, koro, muskolo, k.t.p.) transplantita en medio speciale preparita kaj plurfoje renovigita, povas resti vivanta kaj daŭrigi kreski dum pli, ol sesdek tagoj. Ne estas pridubeble, ke oni sukcesos pluigi en vivo, en konstanta maniero, histojn devenantajn el la korpo de la bestoj — aŭ de la homo.

Jakobo Loeb, en alia kampo, meritas nian simpatian admiron.

Li efektivigis la ĥemian fruktigon.

Prenante virgajn ovojn de ekinoj, li ilin fruktigas, ne per la faro de la Sankta Spirito, sed ilin kontaktigante kun grasa acido.

La vivo ĉesas esti neklarigebla mirindaĵo, ĉar la klerulo, en lia eksperimentejo, povas sin substitui, kvazaŭe, al tiu fama viva instinkto, kiun ni fine atingis nek difini, nek kompreni !

Mia eminenta amiko, Profesoro Erera (Herrera) el Meksiko, same efektivigis laborojn, kiuj meritus esti pli bone konataj.

Li fine atingis, efektive, fabriki VIVAJN ĈELETOJN.
Per formolo, plumba acetato, mi ne scias kion ankoraŭ (la ekzakta formulo de la mikso estas tre simpla, kaj povas esti efektivigata de iu ajn eksperimentisto), li sukcesas krei malgrandajn gelatenajn masojn, kiuj moviĝas, sin moviĝadas, kaj iras ĝis sin reprodukti, sin dupartigante.
Simplaj skizoj, ankoraŭ neperfektaj, konsentite ? Sed, ĉu tiu larva bildo de la vivo, atingita eksperimente, artefarite, ne venas konfuzegi ĉiujn niajn malnovajn konceptadojn ?

⁂

Fakte, ekzistas tri hipotezoj pri la deveno de la homo.
La unua, kiu eĉ ne meritas esti kontraŭargumentata, konsistas diri, ke Dio kreis al Sinjoro Adamo kaj al Sinjorino Evo, ilin fabrikante propramane — kaj tute (kaj perfektaj ! !).
La dua hipotezo, preskaŭ forlasita hodiaŭ, nomiĝas la spontanea nasko. Ĝi deklaras, ke la vivo povis ekvidiĝi spontanee sub elementa formo, sur la surfaco de la terglobo, en iuj kondiĉoj de temperaturo kaj medio, kiujn ne eblas al ni restarigi.
Fine, tria hipotezo, la plej saĝa el ĉiuj, supozas ke la elementa ĉefa ĉelo, antstataŭe spontanee subite spruĉi el la materio, devenus el aliaj planedoj, kaj estus estinta transportita sur la tero pere de iu meteorŝtono. El tiuj organismoj (verŝajne malgrandegaj) estus elirintaj per iom post ioma evoluo, kiu necesigis milionojn da jaroj, la bestaj formoj nune ekzistantaj.
Mi diras, ke tiu hipotezo estas la plej saĝa. Sed, realece, ĝi ne forigas nepre la duan hipotezon, tiu de spontanea nasko. Ja necesis, ke la unua viva ĉeleto fariĝu meze en « neorganika » materio ! Ke tiu spontanea nasko estu okazinta sur nia tero aŭ (pli verŝajne) sur alia globuso, eble kuŝita je miliardoj de mejloj al nia kara malgranda planedo, tio tute ne diferencas...
Sed, kial ni konsiderus tiom grava tiun trairon de la neorganiko al la organiko ?
Ni estas liberigitaj je la superstiĉo de la vivanto kaj de la inerto.
La unua viva ĉeleto ne estas, laŭ mia opinio, la vera elirpunkto.
La lumo, la transviolaj radioj, la akvo de la oceanoj, la ĉielaj polvoj, la elektraj radiadoj, ĉio tio estas viva, ĉio tio estas riĉa de estonteco...
Ne estas limfiksado inter la fenomenoj de la naturo: Ĉu ili aspektas al ni simplaj aŭ malsimplaj, ĉu ili estas elementaj kaj maldelikataj aŭ nobelaj kaj altaj, ili estas el la sama esenco. Sub mil malsamaj aspektoj, estas ĉiam la universa, senfina, nekreita vivo, kiu sin aperigas.

Andreo Lorulot, en « Kial mi estas Ateisto ». (Tradukis Gajulo).

# KIEN IRAS LA MONDO ?

Estas nur unu Vivo en la tuta Universo ;
Kaj vi estas tiu Vivo.

Krishnamuri.

Nenie ! Kien vi volus, ke ĝi iru ?
Car la Mondo estas senlima, kiel oni povus aldoni aŭ forpreni al ĝi ion ?
La demando estas do infane bagatela.
« Post centmiliardoj da jarcentoj, skribis Maeterlinck, la situacio estos la sama, kia hodiaŭ ; la sama kia ĝi estis, estas centmiliardoj da jarcentoj ; la sama, kia ĝi estis de iu komenco, kiu cetere ne ekzistas ; la sama, kia ĝi estos ĝis la fino, kiu ne ekzistos pli. »

Kaj eĉ se estus iu « Dio », li nenion povus ŝanĝi al tio...
La Mondo ekzistas kaj ekzistos. Ĝi estis, estas kaj estos.
Tio ne signifas, ke la mondo estas fiksa kaj senmovigita. Ni scias, kontraŭe, ke ĝi estas malkvietigita de senĉesaj repuŝiĝoj, ĉar ĝi estas viva. Kaj estas pro tio, ke ĉio agitiĝas, ke ĉio ŝanĝiĝas kaj sin tute aliigas.
Maeterlinck aldonas :
« En la Universo ĉio estas necese entenita, kaj nenio povas, en la tempo aŭ en la spaco, troviĝi ekster de ĝiaj limoj, ĉar ne povas esti limoj. »
Ne estas loko por Dio ; nenie !

***

Oni konfesos, ke estas ja facile respondi al la « esencaj » demandoj, kiujn faris la sekretega Bergson.

DE KIE NI VENAS ? De Dio, asertas la kredantoj. De la Universo, ni diras !

KIO NI ESTAS ? La verko de Dio ? Tute ne : parto el la Mondo evoluciante !

KIEN NI IRAS ? Al la juĝo de Dio ? Kia burleskaĵo ! Ni reiras de kie ni venis : al la ĉiama iroreirado de la universa vivo.

Komparu la du kategoriojn da respondoj kaj diru al mi, malkaŝe, kiu flanke troviĝas la logiko kaj la klareco ?

Andreo Lorulot, en « Kial mi estas Ateisto ». (Esperantigis Gajulo).

---

Gepatroj ! Viaj infanoj devas iam fariĝi Homoj. Por ke ili taksu sane, ne lasu la pastrojn el iu ajn religio ilin timigi, ilin stultigi. NE SENDU VIAJN GEFILOJN AL LA INFANSTELISTOJ ! !

---

**LA LIBERPENSULO** estas havebla ĉe la redakcio kaj ĉe la frakciperantoj kontraŭ :

| | |
|---|---|
| 1 ekzemplero ..... | 30 francaj fr. |
| 10 » | 250 » |
| 100 » | 2000 » |

aŭ ekvivalento en respondkuponoj. Mendu multajn, por ebligi la naskiĝon de la venontaj numeroj.

---

**FREMDA MEDIO**

Afabla pastro de vilaĝo
Demandis min : « En via aĝo
Akcepti devus vi prudenton
Kaj petit tuj la sakramenton !
Ĉu vi ne timas la inferon ? »
Mi diris : « Ne, ĉi atmosferon
Mi konas, ĉar por viv-ekzisto
Vivlonge estis karbministo !
Tro multe spertis mi suferon,
Nun timas mi ne plu inferon !
Sed tion pastro ne komprenas,
En karbminejon ne li venas ! »

(Josef Burger).

**BONA KONSILO**

Preĝejon, drinkejon evitu
Pro densa nebul-atmosfer' !
Naturon, sunbrilon vizitu,
Birdkanton en freŝa aer' !
Ĉar kie vortbruo silentas,
Foriĝas de homo la tim',
Interne feliĉon li sentas
Pro sano de korpo, anim' !

(Josef Burger).

---

**DIFERENCO !**

Preferu eduki fremdulojn !
Ne risku komenci ĉe vi,
Vi devus vin ŝanĝi hodiaŭ,
Sed mankas por ĝi energi' !
Pro tio eĉ malgraŭ bonvol'
Nun ĉie nur regas parol' !

(Originale de Josef Burger).

ÖNB
+Z65384308

Dum ĉiu tempo kaj en ĉiuj landoj, la pastro estis la malamiko de LIBERECO :
(Tomaso Jefferson, Prezidanto de Uzono 1743-1826).

---

La Kongreso de la Mondunuiĝo de Liberpensuloj okazos en LUKSEMBURGO, de la 2a ĝis la 6a de septembro 1954. Skribu al naciaj asocioj, petante uzon de Esperanto ! !

---

MALVERECO DE LA MIRAKLOJ ! Neniu miraklo okazis antaŭ kunveno de homoj kapablaj konstati la miraklan econ de fakto. Nek la popolaj personoj, nek la mondumo havas kompetenton por tio. Tie necesas grandaj antaŭzorgoj kaj longa kutimo de la sciencaj esploradoj.

Ernest RENAN.

---

## ANKAŬAĴOJ

Mistikaj aperaĵoj favoris en Lurdo iun nekleran kampulinon, nome Bernardino Subirus. La epoko estis ja favora, kaj la doctrino de « Senmakula gravediĝo », tuj dogmiĝonta, estis aktualaĵo.

La viziulino oni enkarcerigis, ĝis sia morto, en monaĥinejon malproksiman de ŝia vilaĝo.

Mistikaj aperaĵoj favoris en Fatimo tri junajn neklerajn geknabojn. La epoko estis favora. De tempo al tempo la Mariokulto bezonas tiajn materiajn firmigojn. Plie nia epoko de turismo rimarkis, ke pilgrimo al Pirineoj tute kongruas kun pilgrimo al Portugalio : sekve la aŭtobusoj ĝemeligas Lurdon kaj Fatimon, kio amuzas la inicintojn, kiuj scias, ke de la komenco la dua estis nur kopio de la unua.

La solan postvivinton de la viziuloj, nome Lucio dos Santos, oni enkarcerigis en monaĥinejon malproksiman de ŝia vilaĝo, kie ŝajne ŝi ankoraŭ vivas.

Probable alvenas la tempo, kiam la serio bezonas novan « enkarniĝon » : Lurdo 1858, Fatimo 1917, ...

Mi konsilas al ontaj viziulinoj, kiuj ne havus emon al monaĥineco, pliprefere rezigni la viziojn. Ĉar memkompreneble, por ŝirmi la veron, kaj firmigi la sanktan historion, oni enkarcerigos la favoriton, ĝis ŝia morto, en foran monaĥinejon.

Ĉetere mia konsilo restos vana, ĉar pliprefere kandidato al la favoro de mistikaj vizioj ne scipovu legi.

***

Ĉiuj religioj estas antropomorfismaj, t.e. ne povas imagi siajn diojn sub alia formo ol homa formo.

Eĉ Zamenhof, kun sia alta idealo pri neŭtrale homa religio, restis teisto, kaj ĉiam skribis « Li » parolante pri Dio.

Logike, Dio devus esti « ĝi », kun aŭ sen grandlitero.

Li, tio estas Dio kun granda barbo, ...barbo, kiun la nekredulo neretenebe ekdeziras petole tiri.

***

« La lernejo, se ĝi ne estas templo, iĝas bestejo », tiel skribis papo Ratti, nomita Pio XIa, en enciklikо pri edukado de la junularo (31-12-1929). Kaj li havis la makiavelan lertecon, citi tiun frazon el verko de laikulo : sed la tuta kunteksto montras, ke li tute alproprigis al si tiun opinion.

Ni memoru la konstantan pretendon de Eklezio, monopoligi la instruadon.

An Kaŭ.

---

*Le Gérant :* André GAY. Langres, Imp. Moderne.

Aprilo-Majo-Junio 1956 Nº 3 1-A JARO

*Por Racio ...*
*Per Esperanto ...*

# LA LIBERPENSULO

ĈiuTrimonata Internacia Revueto de Edukado kaj Instruado
Eldonata sub la Auspicio de S. A. T.--Liberpensula Frakcio
Redakcio: GAY Andreo, Rue Lambert Dumesnil - HERBLAY (S. & O.) - Francio
Abonprezo: 100 francaj frankoj por 10 numeroj C. C. P.: PARIS 10.549-49

## ĈU NECESAS RELIGIO ?

de F. Sonnier (ĉerpita el "La Racio")

Ni tuj respondas : Ne. Kaj ni aldonas, ke ĝi estas ja pli malutila, ol utila.

Nune, religio estas ilo de ekspluatado de la flanko de tiuj, kiuj vivas per ĝi ; kaj de regado de la flanko de la regantoj. Sed ĉiu scias, ke la ĉiela perfekta feliĉego kaj la inferaj penoj estas iluziaj. Cetere nek per la eraro, nek per la mensogo, ni povas subteni la homojn en la vojo de la bono. Estas eĉ en la malpieco, ke la homa estaĵo povas libere disvolviĝi kaj nature elkreski kiel honesta homo.

Tion vi elpruvu, oni diros. Mi povus tion fari. Sed ekzemplo prenita en la realeco de la vivo pli valoras, ol la plej bona rezono.

Mi tre bone konas familion konsistanta el tri personoj : la patro, la patrino kaj ilia ununura filo. La gepatroj, kiuj estas proletoj, estis edukitaj religie en la katolika religio. Sed je ilia plenaĝo (eĉ antaŭe) ili estis sufiĉe inteligentaj, honestaj kaj kuraĝaj por sin liberigi je la religia ŝarĝo al ili trudita de iliaj gepatroj kaj ilia socia medio, kaj senŝanceliĝe rompis kun ĉiu diserva praktiko.

Ilia filo ne suferis la ridindan formalaĵon de la bapto (nek, kompreneble, la stultegan operacion de la cirkumcido). Por lin obeigi, ili alvokis al la sento, al la simpla saĝo, al la racio, neniam al li mensogante. Ili ja sin gardis lin minaci pri lupofantomo, pri infanmanĝanto, pri fantomoj, ktp...

Ĉe la lernejo, li estis sola sen religio, meze de kamaradoj ĉiuj katolikoj, ĉeestantaj la meson kaj la katehismon.

Tamen, bona kamaradeco neniam ĉesis regi. La infanoj estas pli toleremaj, ol la plenaĝuloj.

Poste li iris al la liceo, kie li preparis abiturientan ekzamenon ; poste ĉe la fakultato, kie li ricevis subdoktorecon, kaj fine doktorecon.

Li faris sian soldaton servadon unue kiel oficirlernanto ĉe soldata lernejo, poste kiel artileria rezerva oficiro (Hodiaŭ li estas staba supera rezerva oficiro).

Post konkurso li eniris administracion, kiel ŝtatoficisto, kie li rapide trapasis ĉiujn gradojn de la kariero.

Ĉe lia edziĝo, la fraŭlino kaj ŝiaj gepatroj estus volintaj religian edziniĝon. Li ilin diris : "Elektu inter mi kaj eklezio". Ili elektis la edzon, kaj havas neniun motivon pri pento.

Li estas patro de du infanoj 16 kaj 14 jaraĝaj ; unu estas abituriento, la alia estas fariĝonta abituriento. Kompreneble ili praktikas neniun kulton.

Li nek publike laŭdas, nek kontraŭbatalas iu ajn religion. Lia ilin ĉiuj ignoras. Fakestro, li ignoras la religion de siaj subuloj. Lia metodo estas justeco, senpartieco, ĝentileco, bonanimeco, boneco.

La usonanoj provis lin aĉeti. Ili al li oferis direktorecon de iu filio de la Eksport-Import Banko. Laboro ne tro laciga, altega salajro dolare. Tio estis loga. Post pripensado li dankis kaj rifuzis, preferante servi sian landon je reduktita tarifo pli, ol alilandon multekoste.

Kaj nun, kion pruvas ĉio tio ? - Tute simple ke oni povas esti tute honesta homo kaj iri sian vojon en la vivo, ne portante la senenergiigan ŝarĝon de la prapatraj superstiĉoj. Aliedirite, ia ajn religio estas tute senutila, kaj ja plibone malutila. Tio, kion necesis elpruvi.

706 6+3-0

"A.N.S."-INFORMOJ.
================

E G O I S M A _ R E L I G I A _ E K S K L U Z I V E C O . (Hispanio, H.R.-"A.N.S." Marto 1956)

Ĉie en la mondo, oni konas pli-malpli la realan situacion de hispana religio, sed nenie oni povas imagi kiajn batalojn, enviojn kaj malbonojn okaziĝas inter la religiistoj mem. Tiu ĉi situacio fruktodonas puran egoismon, kion oni pruvas jenan ekz.:

Dum lasta decembro la katolikuloj, kies religio regas oficiale en hispania teritorio, alvokis urĝe kaj maltrankvile ĉiujn siajn adeptojn per radio elsendoj kaj ĵurnaloj, informante ilin pri la konveno esti atentaj, ĉar la protestantoj iniciadis submana kampanjon, kaj iliaj rekomendoj estis tiaj : "La protestantoj profitante favorajn politikajn cir"konstancojn intencas dissemi konfuzon inter la veraj katolikuloj ; malfidu de ĉiuj propa"gandaj folietoj kiuj vin atingus ; petu konsilon pri ili al la pastro katolika de via ur"bo ; ne transdonu ilin al aliaj personoj, tion pretendas la propagandistoj ; espereble tiu "ĉi propagando ne malfortigos viajn korojn plene konvinkitaj pri la SOLA KATOLIKA RELIGIO."

Ĉu ne vere stultaj rekomendoj?-Ŝajne tute ne. La ĉefuloj de la katolika sekto bone konprenas, ke iliaj principoj perdis efektivecon por la popolo. Ili duontimas la rezultojn kaj deziras ilin eviti. Ĉio montras tiun nekaŝeblan egoismon katolikan, kiu pro ĉia favora oficiala pozicio pretendas ekskluzivigi hispanan religion.

Kie restas do la kristana indulgemo kaj frateco tiel serioze postulataj en la biblio ? Ĉio vane. Ne sufiĉas religio por moderigi la egoismon.

Noto de la redaktoro.- Alia "A.N.S."informo pri libereco en Hispanio ni preferas ne aperigi. Ni mem jam ĉesis skribi al bona amiko en Hispanio, pro timo, ke la polico de Franko lin arestu. Ni petas ĉiujn K-dojn, kiuj interkorespondas kun hispanio esti tre singardemaj. Temas pri libereco, eĉ pri vivo de iliaj korespondantoj. Je la nomo de niaj amikoj el Hispanio, ni dankas.

* * *

P A S T R O M A N K O ! (Svisio, E. Keiser.- "A.N.S." Marto 1956).

En la eklezimetio regas manko de "idaro". Kiel la protestanta, tiel la katolika eklezio plendas pri tio. Oni legas en la protestanta berna eklezigazeto "La Semanto"(Der Sämann") inter alia :

"La nombro de teologistudentoj ne estas granda ; sed en malmultaj jaroj oni devas " kalkuli grandan nombron da sin retirontaj pastroj. Kiel eventuala kaŭzo por la sin retenan" ta junularo kontraŭ ĉi-tiu metio oni konsideras la "financan demandon". Ĉu estas manko de " idealismo ? Tiel oni demandas sin." Sed ankaŭ en la protestanta eklezio praktikata "balotpolitiko" forpelas eventualajn kandidatojn. Opinioj en respekto . Sed kiel oni pensas pri la "influo de la nuna epoka spirito al la malmodernaj, eĉ maleblaj instruoj de la biblio ?" Tiel kaj simile estas la analizitaj demandoj.

Noto de la redaktoro.-Tiujn du "A.N.S."informojn ni ĉerpis inter la multaj ricevitaj, kiel kontribuo al la prospero de tiu servo, kiu nepre vivu kaj disvastiĝu. Tia servo vere helpas al la propagando de Esperanto, de Racio ; ĝi do bone servas la Homaron. Nepre franca K-do rilatu kun la respondeculo de "A.N.S.", kiel raportanto. Jen denove la adreson : C. Thomas IRWIN 804 Turk St. San Francisco 2 California USONO.

-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-

Mi diris : "donu senpage tion, kion vi ricevis senpage !
Sed tamen, vi vendas la bapton je la naskotago
Vi vendas al la pekinto indulgencon
Vi vendas al la geamantoj la rajton geedziĝi
Vi vendas al la mortantoj la rajton morti
Vi vendas al la mortintoj la funebran meson
Vi vendas al la familio la diservon je la mortodatreveno
Vi vendas preĝojn, mesojn ; komuniojn !
Vi vendas rozariojn, krucojn, benojn !
Nenio estas sankta por vi, ĉio estas por vi komercaĵo.
(Esperantigis Ŝartel, laŭ Chapuis)

PRO PEKULO ONI PERDIGU ŜIPON !!

Unu el la plej sensaĝaj argumentoj, kiujn religianoj metas sub...via nazo, parolante pri la dia volo, estas ke "pro pekulo, oni perdigu ŝipon"...

Nu, oni povus rimarkigi al tiuj sinjoroj, ke kiam la homa justeco juĝas mortiganton, ĝi punas nur tiun ĉi lastan, kaj ne ankaŭ liajn parencojn, nek liajn amikojn, ktp...

Konsekvence, oni povus diri, ke la homa justeco estas pli justa ol la dia, ĉar ankaŭ la infanoj komprenas, ke oni devu puni, kondamni nur la kulpantojn !!

Sed pro la fato, ke oni ne povus imagi Dion, kiu estus...maljusta punanto, oni devus kompreni, konstati ke Dio ekzistas nur...en la menso de la diritaj religianoj !!!

Eduardo ZUMBO

---oooOOOOooo---

Andreo LORULOT.-

## K I A L  M I  E S T A S  A T E I S T O !

(Antaŭparolo de Han RINER)

---

El la franca tradukis Andreo GE (GAY) kun la permeso de l'aŭtoro.

---

Enkonduko de la tradukinto al la esperantlingva eldono.

Mi ne estas verkisto,kaj ne celas prezenti al vi la verkon de Lorulo. Tion faris majstre,en sia antaŭparolo,la granda pensulo Han Riner.

Mi nur volas en tiu enkonduko atentigi la legonton pri la fakto,ke mi tradukis la 8an francan eldonon,presita en 1933. Certe, se LORULO verkos hodiaŭ libron pri la sama temo, li citos aliajn okazaĵojn.Tamen tia,kia ĝi estas,ĝia verko konservas sian tutan valoron.Ĉar la faktoj de la dudek lastaj jaroj,ĉu sciencaj,ĉu sociaj,estas nur pliaj argumentoj favore al la tezo defendita de LORULO.

Estas multaj pruvoj de tiu aserto.Mi citos nur el la deklaracio al "France soir" de la 18/9/52, de Sro Francisko PERIN (PERRIN), supera komisaro pri atoma energio, la jenan eltiraĵon:

"...-Kiuj estos la praktikaj efikoj de tia eltrovo,kaj la konstruo de tiuj sinkrotonoj (nomo de nova giganta maŝino destinata produkti protonojn.-Noto de la trad.), ni demandis ?

-Estas al ni neeble tion diri nune,respondas la supera komisaro pri la atoma energio.Ĉio,tio apartenas ankoraŭ al la teoria kampo. Tamen, ~~xxxxĝxxxxxxxxxxxxxxx~~ tuj de nun eblas komprenigi la grandan influon ke tiu eltrovo,se ĝi veriĝas eksperimente,havos sur la filozofia kampo. ESTAS,FAKTE,LA NEADO DE LA METAFIZIKO,KIU ATRIBUAS LA KREADON DE LA MONDO AL SUPERNATURA PARTOPRENO." (substrekita de la trad.)

Fine,mi tradukis tiun verkon,esperante helpi al la disvastigo de Esperanto en la Liberpensulaj kaj Ateistaj medioj, kaj helpi samtempe al la disvastiga de Ateismo en la Esperantistaj medioj.Se mi sukcesos, mi ne estos perdinta mian tempon.

Petante pardonon por la eraroj,kiujn eble mi faris en mia traduko, restas nur al mi danki al Sro LORULO,kiu permesis al mi eldonigi sian verkon,ankaŭ la kamaradojn,kiuj bonvolis tralagi mian manuskripton kaj doni al mi konsilojn,kaj vin lasi al ĝia legado.

En Herblay, la 1an de Oktobro 1952.
Andreo GE

-=-=-=-=-=-=-=-

Se la ideo mem de Dio fariĝus palpebla,se Dio mem starus videbla sur la multegoj,la unua devo de la homo estus rifuzi la obeon,kaj Lin trakti, kiel egalulon kun kiu oni kontraŭargumentas,sed ne kiel la mastron,kiun oni suferas.
Johano ĴORES (JAURES) .

Estas pli bone honori al sian patro kaj patrino, ol servi al la Dioj de la Ĉielo kaj de la tero.
BUDA (BOUDDHA) .

Se mi ne kredas al Dio, estas precipe tial, ke la dikredantoj Lin igis neebla.
Andreo LORULO (LORULOT) .

# ANTAŬPAROLO.

"Ĉiu scias, ke la nomo de Andreo LORULO estas samsenca kiel sincereco, klarvideco kaj kuraĝo". Tiuj paroloj de la kuraĝa, klarvida kaj potence sincera Viktoro MARGERIT (MARGUERITTE) revenas al mia spirito ĉiufoje, kiam mi legas aŭ aŭskultas al Andreo LORULO. Ili resonis, glora fanfaro, en mia penso, kiam mi ektralegis tiun "Kial mi estas Ateisto", pri kiu mia kara LORULO faris al mi la honoron peti, ke mi verku kelkajn liniojn antaŭparole.

Pli kaj pli antaŭenlegante la novan libron de la nefatigebla propagandisto, la belega laŭdo al mi aspektis baldaŭ nesufiĉa. Mi konstatis pli kaj pli bone -ke mi jam konis- kelkajn meritojn ĉe LORULO, nekalkulante tiujn, kiujn "ĉiu scias".

Al mi li tro modeste skribis, ke lia libro "neniel pretendas revolucii la malnovan problemon". Li aldonis: "Mi ankaŭ scias, ke miaj opinioj ne tute similas la viajn".

Kaj mi eklegis, intencante amike kontraŭmeti la opiniojn de la antaŭparolonto, al tiu de la aŭtoro. Tiun projekton mi rapide forlasis.

Ĝi havis sian belecon. Plezure mi estus montrinta du individuistojn, ekzercante kun la samaj konscio kaj ĝojo, ĉiu laŭ sia temperamento, sian pensan liberecon; du malamikojn de la dogmo, unu pli diskutema, la alia pli revema, ĉiu ĝuante sian naturan ritmon, kaj samtempe, kelkfoje preskaŭ identa, la najbaran ritmon; du konceptadojn, kiuj miras nek kiam ili proksimiĝas ĝis ŝajna sameco, nek kiam, sen malamikeco, ili malproksimiĝas per movado kaj rideto tiom iomete malŝatema, ke el inter la bonrezultatoj de tiu malproksimeco, mi antaŭ ĉio kalkulas la volupton, pli bone tutamplekse vidi la harmonion de la kamarado.

Estos necese, por dismontri tiun belaĵon, atendi pli favoran okazon.

La malnova problemo tiom estis agitinta ĉiusence, kaj laŭ tiom da saĝaj aŭ malsaĝaj metodoj, ke ne plu eblas fakte ĝin "revolucii". Tamen, la maniero laŭ kiu LORULO ĝin prezentas kaj studas, havas sian multvaloran novecon. Tiu renovigo estas ŝuldata, mi tion atendis, al klara ordo, kaj al logikeco sekura ĝis gajeco. Ĝi estas ŝuldata ankaŭ al bela ekvilibrita pleneco. Malgraŭ la malsimileco de niaj temperamentoj kaj de niaj ritmoj ĉio, kion mi estus povinta diri pri la problemo, LORULO tion diris. Kaj li min riĉigis per pasiigaj ĝeneralaĵoj, kiujn mi ne estus trovinta.

Mi konjektis, ke li kontentigus, plenplenumus eble trans miaj deziroj tutan mian logikan avidecon. Sed ĉu li ne lasos sen nutraĵo, kaj eĉ ĉu li ne sukcesos vundi miajn poetajn postulojn? Mia espero, mi tion vidas, eraris preskaŭ tiom, kiom mia timo. Ne estas nur je la nomo de lia racio, estas ankaŭ per lia tuta koro leviĝata, per lia tuta konscio indignata, per ĉiuj liaj povoj noble homaj, ke LORULO kondamnas la fikcion Dion. Kiel liaj koro kaj konscio, ĉiuj sentema koro kaj vere vigla konscio postulas -tuj kiam la ribelo ~~dextkaxinfanaĵo~~ kaj la infanaĵo de la blasfemo estas forlasitaj- la kvietan, la ridetantan ateismon.

Logike, mi ne ĝuste scias. Logike, mi estas eble malpli ateisto, ol pozitivisto kaj agnostikisto. La ĝeneralaj konsideraĵoj, kiujn LORULO faras pri la mikso de ordo kaj de malordo, kiuj konsistigas nian malfeliĉan fuŝitan kosmon, aŭ pri la eterneco de la mondo kaj de la vivo, min ĉarmus, se ili ne havus ian memfidan akcenton iom ja nediskutebla. Ĉiu metafiziko bezonas je la komenco partiecon aŭ, por paroli pli ĝentile, postulaton. Tiu, kiu prezentas sian elekton, kiel aksiomon, min iom maltrankviligas. LORULO montras antaŭ la kontraŭnomecoj sentimecon, kiu al mi mankas. Li maltime solvas kaj fermas majstre tiun problemon, kiun mi lasas malfermata, kaj kiun mi kredas nesolvebla alie, ol en la revo. Liaj asertoj estas, tamen, multe pli verŝajnaj, ol tiuj de la kredo.

Daŭrigota.

Kelkaj minutoj kun MAJSTRO...

...

Kaj li ekdubis pri la boneco de Dio.-"Estante ĉiopova, li diris,iu Dio ne volus ami la doloron; li estus senlime feliĉa kaj devus fakte nescii la doloron; nesciante la doloron,li estus sensenta; kaj estante sensenta li estus egoisma,senkompata,kaj lia senkompateco lin farigus malbona". Kaj li konkludis:"Iu ĉiopova Dio ne povus esti bona. Do Dio estas malbona;se li estas malbona,li estas malica..."kaj li ekdubis pri la ekzisto de Dio.

Kaj ekdubinte, li ekrezonis:"Kiel imagi iun ĉiopovan Dion: ĉar la ideo pri ĉiopoveco kontraŭstaras kun la "neeblo".SE LA "NEEBLO" ekzistas, LA "ĈIOPOVECO" NE POVUS EKZISTI. Kaj tamen la "neeblo" ekzistas, do la ĉiopoveco ne ekzistas". Kaj la pastro suriris la altaron, por preni la sanktan sakramenton kaj beni la piulojn. Kaj liaj manoj tremis prenante la hostimontrilon. Kaj dum li sin turnis,la argenta kaj ora hostimontrilo forglitis el liaj manoj kaj falis antaŭ la ŝtupoj de la altaro, kie ĝi rompiĝis.

Kaj pro tio li subite konsterniĝis.Kaj kolektinte la pecojn,li ilin enfermis en la sankta ŝranko. Kaj li forkuris el la preĝejo,ne komprenante kial Dio, kiu sin tenas en la senenhaveco kaj,kiu estas tute en la eŭkaristio, povis fali el liaj manoj. Tiom da mirakloj okazis iam. Kial Dio mankis nun de majesteco antaŭ la piuloj, kaj ne montris, ke li estas vere en la konsekrita hostio.

Kaj li sin demandis: -"Kiel Dio,se li estus tute en la eŭkaristio, povus esti samtempe tute en ĉiu, kaj en ĉiuj ĝiaj partoj, kaj troviĝi samtempe ĉie. Se li estus ĉie, li troviĝus ankaŭ en la legomoj kaj en la viando, kiujn ni manĝas. Kiam ni manĝas porkon, ĉu Dio troviĝas en la porko? Kiam ni nin ebriigas,ĉu Dio troviĝas en la alkoholo? Kiam ni nin venenas,ĉu Dio troviĝas en la veneno? Ĉu li troviĝas en la tranĉilo de la fimortiganto,kiu mortigas?...kaj en la ventro de tiu,kiu seksperfortas la virgulinon, donas la vivon kaj forlasas sian kreiton?... Kaj li pripensis pri la bastardo, pri la maljusteco de la homoj kaj pri la maljusteco de Dio.

Kaj li sin demandis,ĉu la Dio, kiu kreas la bastardojn, la sifilisulojn, la idiotulojn, la malfeliĉulojn kaj la monstrojn, estas justa ? Kaj li ekvidis en Dio monstran maleblaĵon. Kaj li sin demandis tiaokaze, kiu kreis la teron. Kaj li memoris, ke la religio instruas, ke Dio kreis la universon el nenio. Kaj li pensis: "Kiel krei el nenio ?...FARI ION EL NENIO ?"...kaj esti en la "nenio" de "eterneco" ! Ĉar se Dio kreis la materion el nenio, iam li ekzistis sola en la nenio, se ne, ne estus estinta kreado. Kaj li imagis la senliman nenion, en la daŭro de la senlima tempo,kiam Dio estus antaŭekzistanta je senokupa stato sen komenco. Kaj li diris:"Dio estas malebleco; Dio, tio estas la lasta idolo, kiu hodiaŭ devas cedi la lokon al la naturaj,elementaj kaj pensokapablaj fortoj,kiuj direktas la destinojn de la mondo kaj de la universo.Ni provu koni la Veron".

Eduardo DAANSON."Libro de la Homaro".Paĝoj 39ĝis4I.
(Esperantigis gajulo).

---

ALVOKO al ĈIUJ.- Ni bezonas ĝis nun 200 ekz.ojn,sed ni eldonis nian bultenon pligrandkvante.Ankaŭ nia presita "propagandilo okpaĝa ni eldonis I.000 ekzemplere.Ni ankoraŭ disponas proksimume je 400"propagandilojn", 20 bultenojn nº Ia kaj 60 bultenojn nº 2a.

Ni estos dankemaj al la K-doj,kiuj mendos kelkajn por sendi al konatuloj,aŭ kiuj sendos monon kaj adresojn.Ni tiaokaze zorgos pri la sendado. Sendube per tiu rimedo ni gajnos kelkajn novajn abonontojn.

La Redakcio.

PLI FACILE ESTAS KREDI !

Bonaj katolikoj kredas
Firme al purgatori'.
Sed inverse protestantoj
Ridas de Kompat' pri ĝi.
Tamen kredas protestantoj
Same firme al infer',
Sen posedi etan pruvon
Pri la vero de l'mister'.
Vi demandas: "Kial daŭras
Ĉi facilkredemo plu ?"
"Estas ja pli oportune
Ĉiam naĝi kun la flu' !"

TRO ŜPAREMA !

Laŭ la diroj kreis Dio
Nian mondon el nenio.
En ses tagoj li ĝin faris.
Nun, pro tio ke li ŝparis
Tempon kaj materialon,
Vidas daŭre ni disfalon.
Sed konsolas nin espero :
"Di-infanoj sur la tero
Nun per bomboj celas vete
Ĝin detrui plenkomplete.
Ni - sed lernu el la temo,
Ke ne taŭgas troŝparemo !

(Originalaj poemoj de J. Burger)

-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-

ENKETO.- Ĉiuj skribemaj K-doj estas invitataj diri, ĉu en sia lando oni festas la solsticon de la vintro, kaj priskribi kiamaniere oni ĝin festas.

La solstico de la vintro estas, kiam la tagoj estas la plej mallongaj kaj la noktoj la plej longaj de la jaro. Logike la festo devus okazi dum la lasta nokto kaj la morgaŭon. Tio estas ĵus kiam la tagoj iomete relongiĝas, ĉar estas antikva festo de la reviviĝantaj tagoj, de la venko de la taglumo super la malvarma nokto. Tiu perioda tempo sin situas en la norda parto de la terglobo de la 20ª ĝis la 30ª de decembro. En Eŭropo dum la antikvaj tempoj kiam la homoj ne precize mezuris la tempon, ili starigis la feston je iu dato kiu proksimume estis la nuna, kiu estas la 25ª de decembro. La katolika pastraro ankaŭ elektis tiun daton por renaskiĝi al Jesuo-Kristo, pretende dirita la "filo de Dio"! Kaj ĝi nomis tiun feston "Kristnasko". Tiamaniere ĝi triumfigis la kaŭzon de Dio kaj precipe kompreneble la sian. La preteksto estas bona por plialtigi la potencon de la katolika religio kaj rikolti multe da mono por la grasiĝantaj ekleziuloj.

Diru ankaŭ, ĉu en via lando la praktikataj religioj ankaŭ akaparis tiun feston.

Bariteaud.

-8-8-8-8-8-8-8-8-8-8-8-8-8-

NI RIDU IOM !! La papo havis lakeon, kies tasko estis lin veki ĉiutage je la sepa, dirante pri la vetero kaj pri la horo. Jam de du semajnoj li akurate faris sian servon; kaj ĉiam li ricevis jenan respondon: "Mia filo, Dio kaj mi tion scias". Lacigita de tiu respondo nia servisto, kiu ne estis piulo; nepre esperis ŝerctrompi la papon. Do, la morgaŭo :

-La lakeo: "Sanktega Moŝto, estas la sepa, kaj sunas".
-La papo: "Mia filo, dio kaj mi tion scias".
-La lakeo: "Ĉu jes , Do, dio kaj vi estas du... stultuloj ĉar estas la deka, kaj pluvas!"

Populara franca enekdoto esperantigita de Gajulo.

+-+-+-+-+-+-+-+-+-+

INTER NI ! NOEL (Francio).- Ni uzos vian kopion por iu venonta numero. Pri "Heroldo" petu niaparte rekte al E. Delaire, Esp. Office en Orleans (Loiret). FALGIER (Usono).- Ni dankeme akceptas vian proponon. Vi baldaŭ ricevos la tutan presotaĵon por la nº 4ª, ankaŭ delatoj letere. MARTIN kaj GIBAUX (Francio), DORMONT (Usono).- Ne tro atendu, ni petas, por pagi la ricevitajn numerojn, ĉar nia monujo estas tute malplena.

==========================================

L(Imprimeur-gérant/ GAY André. Imprimerie spéciale de "La Liberpensulo"
rue Lambert Dumesnil -HERBLAY- (S.& O.) FRANCE.